
HEJS JUNECO

HISPANA ESPERANTISTA JUNULARA SOCIETO

ATOCHA, 98-4.° - TEL. (91) 230 87 98
28012 MADRID

MARTO-1986
N-ro 126




# LA DEMONO JAM ESTAS KONEKTITA

# HEJS -JUNECO

Eldonas, H.E.J.S., Atocha 98-4º 28012-MADRID

Redakcio, Sol 83-85, 41003-SEVILLA

Direktoro, Alberto Franco Ramírez

Redaktorej, Ricardo Felipe Albert Reyna
Francisco Javier Moleón

Kunlaboras, Prezidanto de HEJS: Miguel A. Sancho
Ricardo García Tarín
Karulo
Francisco A. Antúnez Romero
Julio Bueno
George Kamaĉo (bildoj kaj artikolperanto)

Presita ĉe Siksto-publikaĵoj. Makarenofset-1986

NUMERO 126

MARTO 1986

## enhavo

1........................ La domeno jam estas konektita...
2................ Tio, kion vi vidas, stultul´...........
3.....................................Ĉefartikolo....
4........................ Zamenhofa tago en Ĉesto......
5....................................... Ĝis Kiam.......
7.............. Informoj kaj aliĝilo por la tendaro.......
11................. Sevilja Ekspojuneco: Incidentoj........
12.........................Propagando de Ĉiesrevuino......
13...........................La aliĝilo...................
14.................... Internacia hispanlingva tradukkonkurs´
15......................... 45-a hispana k. de E-o.....
16..... ATENTU! PRENU LA TORNISTRON KAJ... BARBASTREN!!!!

# ĈEFARTIKOLO: ESTIMATA MEMBRO:

Miguel Ángel Sancho Pardo

Prezidanto de HEJS.

Jam de kelkaj monatoj HEJS tenas konversaciojn kun Kataluna Esperanto-Junularo kun la celo atingi interkonsenton pri agado kaj kunlaboro. Estas sciate, ke ambaŭ organizoj defendas ege malsimilajn poziciojn, kiuj malfacile proksimigeblas.

La nuntempa estraro de HEJS deziras solvi ĉi problemon tuj. Ni jam komence petis la opinion de niaj katalunaj membroj kaj enketis diversajn interesiĝintajn gravulojn de la hispana movado. Ni atingis jenan konvinkon: ni ne povas resti neflekseblaj, eĉ se ni nin opinias pravaj, tial, ke ne ekzistas morala rajto akceptigi nian opinion al plejmulto. Estas absurde endanĝerigi la progreson de la Internacia Lingvo en Hispanio nur pro burokratiaĵoj. La estrato deziras atingi interkonsenton kontentigan por ambaŭ asocioj, kaj konsideras la eblon, se niaj membroj konsentas, akcepti punktojn ĝis nun eĉ nediskuteblajn.

Ĉio ĉi ne signifas pravigo aŭ HEJS-a malvenko. Ebla interkonsento devos sendube plenumi plurajn kondiĉojn. Tiom absurdas neflekseblo, kiom absoluta akcepto de la tezoj de KEJ. Ĉiel ajn ni devas eviti katastrofon en la neferta hispana movado.

Ni klare diru, ke dum jaroj nejusta propagando prezentis al eksterlandanoj tre strangan bildon pri la hispana movado. Nuntempe pluraj TEJO-anoj konceptas nin faŝistaj subpremantoj de la kataluna popolo. Tial mi ricevis cenzuro-minacon en Koncize, aŭ laste en TEJO-tutmonde la redaktoro senhonte insultas nin per stranga titol-lokigo.

HEJS ĝis nun fajfis pri multaj tiaj insultoj. Aliflanke KEJ, miaopinie, sincere emas ŝanĝi tian situacion. Nur en bona etoso ni povos atingi ion. Necesas ambaŭflanke malmaligi la aferon. Se ni daŭras sinceraj kaj kapablas estigi afablan, eĉ amikan, interrilaton, certe ni ege baldaŭ povos interkonsenti. La estraro laboras nun por tute nova propono al KEJ. Espereble ni povos pridiskuti tion en Barbastro. Pri rezultoj vi estos tuj informata.

# ZAMENHOFA TAGO EN ĈESTO:

INFORMAS:
Ricardo García Tarín.

La pasintan 14an de decembro okazis deneve en Ĉesto, urbo de la Valencia Komunumo, intensiva kurso de Esperanto, ĉi-foje por progresantoj. Kvankam ne estis multaj ĉeestantoj la nivelo estis bona laŭ vortoj de la profesoro, s-ro Dennis Keefe. Ĉi kurso finiĝis per amika vespermanĝeto.

La sekvan tagon, dimanĉon, oni festis la zamenhofan tagon far la valencia esperantistaro.

Je la dek-unua, proksimume, koncentriĝis samideanoj el la tuta provinco en la ĉefa placo de nia urbo. De tie ni vizitis la straton "Francisco Núñez", pioniro de la hispana esperanto-movado kaj fondinto de la loka grupo. Post vortoj pri la sindonema kaj efika agado de tiu ĉi bonega esperantisto, far la ĉesta grupprezidanto s-ro Arnau, la loka urbestro metis laŭrkronon memore de li en lian memorplaton. Poste oni enmetis laŭrkronon en la straton D-ro Zamenhof, parolante la Valencia grupprezidanto, sekve de la kantado de "La Espero".

Je la unua ni vizitis la vinfarejon "CHESTE VINÍCOLA", grava produktejo de vinoj, misteloj kaj alkoholaĵoj. Tie ni gustumis la bonegajn vinojn kaj mistelojn, pro kiuj dufoje jam vizitis rusa delegacio. Ĉi tiu kelo estas krom la plej antikva el Valencio.

Je la tria okazis tagmanĝo en la restoracio "Bar León" per tipa valencia rizaĵo (paella). Post tagmanĝo parolis la reprezentantoj de la grupoj de la diversaj urboj ĉeestantaj, ankaŭ nia samideano Dennis Keefe, kiu loĝas en Valencio jam de kelkaj jaroj kaj la loka urbestro, kiu ĉeestis la tutan feston kaj apogas senkondiĉe Esperanton. Danke al li la ĉesta grupo havas sian novan ejon en la estonta kulturdomo. Poste nia ankaŭ aktoro, s-ro Arnau, ĝojigis nin per poezioj kaj prozaĵoj. La tago finiĝis per vizito al la preĝejo (kies turo estas la plej alta de la tuta provinco kaj enhavas belegajn pentraĵojn) kaj al la antikva maŭrdevena kvartalo . En amika kaj agrabla etoso la ĉeestantoj adiaŭdiris ĝis venonta okazaĵo, ŝatinte la okazintan.

# Ĝis kiam?

Verkis KARULO

(PERE DE GEORGO KAMAĈO LA AŬTORO ALVENIGIS TIUN ĈI ARTIKOLON AL NI. ĜI PLI FRUE APERIS EN "HEROO", REVUO DE JUNAJ KATALUNAJ ESPERANTISTOJ)

Ĝis kiam oni ne komprenos Katalunion? Mi estas kataluno, mi havas kulturon, morojn, lingvon, sentojn, kaj cetere... KATALUNAJN. Neniu povas "magie" forviŝi tion. Se iu malaperigus ĉian politikon el la tuta tero, Katalunio daŭrus kiel nacio, ĉar Katalunio estas socia afero, sed ne politika. Intenci forviŝi la katalunan landon estas agi kontraŭnature. Mi kaj kiu ajn deziras esti internacia (amikema pri aliaj nacioj), unue devas esti nacia, komprenoble. Katalunio deziras kunlabori kun ĉiu lando de la mondo, petas nur tion, ke oni rekonu ĝin kiel naturan nacion. Aliflanke, laŭ la interna ideo de Zamenhof (mi opinias), la frateco inter la homoj okas kune kun la justeco kaj libereco, tiel individue kiel kolektive. Katalunio estas kolektive kun propraj deziroj; oni do respektu tion samamaniere, kiel respektas Katalunio aliajn. Mi serĉas neniel la sendependecon je Hispanujo, sed la komprenon de nia diferenco kaj nia personeco. Tiel, kiel ekzistas naciismo miskomprenita, ekzistas ankaŭ iom da hispana Imperiismo, kiu intencas igi Katalunion kastilia lando... Tio estas neĝusta.

Sen politiko Hispanio ne ekzistus. Alimaniere ankaŭ Portugalio estus hispana, ĉu ne? Krome neniu povas esti sennacieca; oni povas esti malferma, internacia, helpema, solidara, ktp. sed ne sennacieca. La homaro ne estas granda "ŝafaro"; "ŝafararo" eble sed ne "ŝafaro". La homoj povas vivi kaj senti kune, tamen ne egale, kvazaŭ maŝinoj. Ĉiu nacio povas, libere, labori por la humanisma evoluo de l'homaro. Samamaniere unu homo povas helpi alian. Sed la naciismo estu neniam fermita aŭ netolerema; ĉiu homo estas nia frato malgraŭ tio, kiujn ajn ideojn li havas.

Mi estas preta helpi hispanon, same kiel anglon, ruson, kt-

p. Ĉiu lukto, kiu celas humanistan ideon, eliru kune kun la egaleco je rajtoj. Tial, malgraŭ la disvastiĝo de la angla-lingvo, ni ne estas angla-lingva esperantisto; tial, malgraŭ la disvastiĝo de la hispana lingvo, ni ne estas hispanlingva esperantisto.

Pro tiu certe mem, ke paco, libereco, homaj rajtoj... estas universalaj celoj, ĉiu popolo konkeru sian parton de la idealo. La mondo estas kvazaŭ granda ĵigo; ĉiu popolo klopodu esti klarigita kaj bone desegnita, por unuiĝi ĝuste ĉe la aliaj, ĝis ili formos la "unuiĝintan homaron".

KARULO.

---


ATENTU !!!

La tendaro ne okazos en ZARAGOZO sed en proksima urbeto "BARBASTRO"; Pro tio pardonu la eblajn ŝanĝojn en la programo.

«PLIE INFORMIĜU LASTRA-ĜE.»

HISPANA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO
Atocha, 98-4'. Tel. (91)2308798
28012 Madrid

JUNULARA ESPERANTISTA SOCIETO ARAGONA (JESA)
Apartado 149
50080 Zaragoza



# 10a HISPANA JUNULARA RENKONTIĜO

Zaragoza, 27a-30a de Marto, 1986

# 10a TENDARO DE HEJS

## 27a-30a de Marto, 1986

## Zaragoza

** PROVIZORA PROGRAMO **

Jaudo, 27a:
20.00 -Interkona vespero.
      -Disdonado de dokumentoj.

Vendredo, 28a:
10.30 -Oficiala Malfermo.
11.30 -Elementa kurso de Esperanto.
      -Junaj verkistoj.
13.00 -Vizito al la urbo.
17.00 -Ordinara kunveno de HEJS.
      -Elementa kurso de Esperanto.
      -KAPE.
21.00 -Distra vespero.

Sabato, la 29a:
9.00 -Sporto.
11.30 -Elementa kurso de Esperanto.
      -Fakaj kunvenoj.
12.30 -Vizito al la "Alfajeria".
17.00 -Prelego de akademiano F. de Diego. Eventuala posta debato.
20.00 -Komuna foto.
21.30 -Kuna noktomanĝo.

Dimanĉo, la 30a:
11.30 -Elementa kurso de Esperanto.
12.30 -Debato: "Kiel atingi bonan lingvo-kapablon?".
17.00 -Oficiala fermo.

# KONTAKTOJ:

Telefona # Jose Vicente Garces,

3 8[illegible] 47 95

Poŝta # "JESA" Apartado 149

50080 Zaragoza

*******************************

Baldaŭ oni diskonigos la adresojn de la loĝejo kaj de la kunvenejo. ATENTU informojn en la revuo "HEJS-Juneco".

Ni avertas, ke peskraŭ certe vi bezonos DORMOSAKON.

Sendu vian aliĝilon kaj kotizon al la poŝta kontakto.

*******************************

KOTIZOJ:

- Membroj de HEJS.... 100 ptj.
- Junuloj (sub 26)... 200 ptj.
- Aliaj.............. 300 ptj.

La kotizo ne kovras eventualan pagon de loĝado kaj manĝoj.

*******************************

## *** ALIĜILO ***

Mi sendas_____ptjn kiel__________

Nomo______________________________

Antaŭnomo_________________________

Adreso____________________________

__________________________________

Urbo______________________________

Poŝtkodo______Provinco____________

Aĝo____Lando______________________

Subskribo:

## VENU EN ZARAGOZON!

Se vi iam venis en la Tendaron de HEJS, ne necesas, ke ni plu klopodu konvinki vin. Vi certe havas jam emon partopreni.
Ĉu vi ankoraŭ neniam?! Ne eblas!. Tuj plenumu vian aliĝilon kaj sendu vian kotizon. Neniu serioza juna esperantisto povas nomi sin tia, se li ne pilgrimis almenaŭ unu fojon en la vivo al tiu mondfama evento.

## PLURAJ SALUTOJ RICEVITAJ

* Zamenhof: "Mi ege bedaŭras ne povi ricevi permeson de Sankta Petro, ĉeesti tiun brilan elmontron de la povo de nia ideo"
* Reagan kaj Gorbachov (kuna letero): "Ni ambaŭ miras pri tio, ke, malgraŭ ni, homoj ankoraŭ interesiĝas pri paco. Sinceran gratulon."
* Dio sendas pardonon por ĉiuj ĉeestantoj. "Ne seks-peku", li diris telefone al la estraro.
* La prezidanto de la Eŭlofa Parlamento: "Mi neniam povis imagi, ke hispanoj kapablas kunveni kaj eĉ uzi la lingvon Esperanto. Certe mi devos ŝanĝi mian opinion."

Rememoru:
Se drinkant'a, ne sstirrr'uu!

# SEVÎLJA EKSPO-JUNECO: INCÎDENTOJ.

RAPORTAS: Francisco A. Antúnez

Rajde inter la pasintjara fino kaj la ĉi-jara komenco okazis en Sevilje la jam kutima Ekspo-juneco, kie oni montras ne nur por junuloj junularinteresaĝojn kaj aliajn ne tiel interesajn aferojn.

Ĉi-foje SEJO, la esperanta junularasocio de Sevilje, kon traŭe sian kutimon fuŝi, sukcesis sin rajtigi por montri espe rantaĵojn en la ekspozicio, Kvankam ni ne havis propran standon kaj ni ne estis tie ĉiame, ni bone plenumis nian taskon: diskonigi E-on, ĉar fakte dum tiuj kelkaj horoj, kiujn ni ĉeestis, interesiĝis pri esperanto pli da personoj ol dum tri jaroj en nia klubejo aŭ Akademio. Ni bone ŝajnigis ion gravan en la gazetarstando, kien oni nin enmetis, inter gazetmuraloj, teleteksta ekrano, teletipo (kiu tiom multe allogis nian amikon Antono) kaj -kiel ne diri tion- ĉarmaj knabinoj jam pli virinecaj ol knabinecaj (je iuj el iŝi la "indico de knabineco" ja estas nulo, se pareli fizike) enketantaj la vizitantojn pri seksaferoj.

Ankaŭ ni faris muralon per esperantrevukovriloj, sed ĝi metatis preskaŭ kaŝite. La bonaj propagandiloj estis nia ĉeeste, la revuoj kaj gazetoj, kiujn ni montris, kaj la propagandaj broŝuroj, kiujn multaj personoj prenis (iĝi ja estas tre taŭgaj por sin aerumi en tiu varmeta etoso). Eĉ aperis en la gazeto de la ekspozicio artikolo pri E-o far Antono -la teletipamanto- ; mi ĝin ne legis, mi tamen certas, ke ĝi tiel pezas kiel ĉio lia.

Memo pri la ekspozicio ne indas raporti, ĉar ĝi tute estis ordinara, sed mi paroles pri kelkaj incidentoj okazintaj:

Unue hontindas la doneva ĉeesto de armeuloj kaj ties kontingentaĵoj. Sed pli ol la ĉeesto hontindas la abundo. Uniformoj vipadis ĉiesekulojn ĉie en la ekspozicio; oni montris eĉ misilon krom alispecaj armiloj. Ili -la armeuloj- ĉefrolis la la ĉefajn incidentojn dum la evento:

Ekzemple, oficiro pretendis fermeti ol la komikaestando

desegnon de okjara infano, ĉar en ĝi legeblis "vivu la paco. Armeo sob+". La oficiro fotokopiis la desegnon kaj minacis la respondeculojn. Poste oni konstatis, ke la desegno estis manipulata de nekonatuloj (de ĉi tie mi gratlegas ilin). La sama oficiro same malrespektiĝis kontraŭ la aŭtoroj de afiŝo, kie legeblis jeno: "1986 Internacia Jaro de la Paco".

Pliaj armeistoj, ĉi-foje moraj, postulis la tekston de la priseksa enketo, kiun oni faradis en la ekspozicio al gejunuloj, ĉar ili opiniis, ke ĝia enhavo atencas la moralon kaj la bonan moron. Oni trankviligis ilin dirante, ke ili misinformitas.

Grava povis esti la disputo inter la Armeo kaj la radioentrepreno COPE pro loko en la ekspozicio. La afero finiĝis per telefonado al Madrido de iu antaŭsupozeble "stelisto" -so tiel nomi kiu portas stelojn-. La armeuloj okupis la pridisputitan lokon, kaj la radio kion ili lasis.

Esperable venontjare pliabundu E-o kaj ne aperu Armeo. Estu tiel!

---


ĈIESREVUINO

Distra, fia, skandalema...

SEVILA FANZINO

4-numera abono: 200 pes. (unu jaron).

PETU PROVEKZEMPLERON AL LA ELDONEJO:

S.E.J.O. str. Pozo 3
41003-SEVILJO (Hispanio).

# FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Carreras Candi, 36 - Tel. (93) 240 26 62
08028 BARCELONA

*La labor personal, por efectiva que sea, no puede alcanzar, en modo alguno, la labor desarrollada por equipo; por ello, aconsejamos a todo esperantista y simpatizante, consciente de la necesidad de una más amplia difusión y divulgación del idioma internacional en todos los estamentos culturales, educativos, científicos y oficiales, se una y colabore con nuestra Federación.*

*Así pues, hágase socio de la F. E. E. remitiendo a la dirección de nuestra sede administrativa esta hoja de inscripción; y su cotización anual a nuestra cuenta en*

## CAJA DE PENSIONES PARA LA VEJEZ

**Libreta 2.303-26**

**Agencia 436 (Riera Blanca) 08028 BARCELONA**

*Su desinteresada aportación permitirá a la Federación y a la Asociación Universal de Esperanto (UEA) una actuación más eficaz en el ámbito español e internacional, ya que UEA recibe el 5 °/o de su aportación.*

## COTIZACIONES ANUALES

| | | | |
|---|---|---|---|
| CUOTAS: | Individual | 1.000 ptas. | |
| | Protector | 2 000 » | |
| | Vitalicio | 20.000 » | |
| (H.E.J.S.) | Juvenil | 750 » | (menores de 26 años) |
| | Mayores | 750 » | (sin trabajo) |

## HOJA DE INSCRIPCION

*D.* ...........................

*de* ......... *años, de profesiòn* ...........................

*con domicilio en calle, plaza* ...........................

*Ciudad* ........................... *Provincia* ...........................

*desea inscribirse como socio* ......... JUVENIL .........

*Por lo cual remite la cantidad de* ...........................

# INTERNACIA HISPANLINGVA TRADUKKONKURSO

## «MADRIDA ESPERANTO-LICEO»

Lige kun la Jubilea Jaro, Madrida Esperanto-Liceo organizas internacian konkurson pri tradukado en Esperanton de nefragmenta proza literaturaĵo el la originala hispanlingva literaturo.

Partoprenu: a) Ĉiu konkursanto rajtas partopreni per maksimume unu verko, antaŭe ne publikigita pres-formo. b) La konkursaĵo devas esti sendita en tri ekzempleroj al MEL, Atocha 98, 4º, E-28012 MADRID, Hispanio.

Anonimeco: Ĉiu kunlaboraĵo devas esti subskribita per pseŭdonimo. La sama pseŭdonimo estu ripetita sur aldonita koverto, ene de kiu troviĝu la plena nomo de la tradukinto kaj lia plena adreso.

Temo: Libera elekto de aŭtoro kaj verko.

Longo: Inter 25 kaj 50 folioj Din A-4, duoblespaca tajpo.

Limdato: /30-an de junio de 1986/

Juĝantaro: Tripersona. La juĝantaranoj ne rajtas partopreni en la konkurso.

Premioj: Estos asignitaj tri premioj. Ĉiu premiita konkursanto ricevos diplomon kaj pokalon dum la Jubilea UK en Varsovio en 1987. La rezultoj de la konkurso estos anoncitaj en la E-gazetaro.

Publikigo: Madrida Esperanto-Liceo rezervas al si la rajto publikigi la premiita(j)n verko(j)n.

MADRIDA ESPERANTO-LICEO
Atocha, 98-4º
E-28012 MADRID
Hispanio.

# 46a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

**VIGO de la 15a ĝis la 20a de julio 1986**

Adreso de la Loka Kongresa Komitato
Círculo Mercantil, strato Príncipe, 44

**Loka Kongresa Komitato:**

| | |
|---|---|
| Prezidanto, s-ro | Julio Bueno Cortés |
| Viceprezidanto, s-ro | Pío Moa Manga |
| Sekretario, s-ro | Jaime Camoa González |
| Kasisto, s-ro | José Carlos Quintana Montero |

## KONGRESEJO

Centro Cultural de la Caja de Ahorros Municipal de Vigo, stratoj Policarpo Sanz, 13 kaj Marqués de Valladares.

## LASTAJ INFORMOJ

La demarŝoj pri la 46a Kongreso komenciĝis dum la pasinta Kongreso en Cartagena kaj nun ni jam povas informi al vi ke jam aliĝis al la Kongreso en Vigo preskaŭ 60 kongresanoj.


La Kongresa Komitato kontaktis kun la urbestrato kaj petis la inaŭguron de strato "Esperanto" kaj financan subtenon.

Oni intencas organizi ankaŭ ekspozicion, altirajn prelegojn kaj allogan folkloran feston.

Artaj kaj Sciencaj horoj, prezentado de novaj verkoj, tuttaga ekskurso, bankedo kaj la ĝenerala kunveno de HEF plenigos la kongresprogramon.

Prelegontoj kaj eldonistoj bonvolu proponi viajn temojn kaj verkojn tuj al la Kongresa Komitato. Ĝis Vigo.

**Julio Bueno**




# 10-a HEJS-RENKONTIĜO

(27-30a marte)

# BARBASTRO (HUESCA)

Residencia Juvenil "Joaquín Costa"

C/. Monseñor Escrivá de Balaguer s/n.

**27-an** ANTAŬRENKONTIĜO EN ZARAGOZO POR KUNE MARŜI DE TIE AL BARBASTRO (ekzistas regulaj aŭtobuslinioj) EN LA SIDEJO DE "FRATECO", San Vicente de Paul, 1-1º.

(Ĉiaj informoj: telefonnumero 976-275713)

Bonvolu antaŭkomuniki vian partoprenon kaj prefere aliĝu (aliĝilo interne).